14-Jaro, N-o 460 MONATA ESPERANTO-GAZETO 25. decembro 1937.

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO, ADMINISTREJO K SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO : 67, avenue Gambetta, Paris-20

Poŝtĉekaj kontoj je nomo de SAT-Paris : Bruxelles n-o 350 189, S'Gravenhage n-o 211 533 Kopenhago n-o 4 986, Paris n-o 1234 22. Stokholmo n-o 74 153, Wien n-o D-109 068, Zagreb n-o 41 448, Zürich n-o VIII-200 49. Alilande oni pagu per poŝtmandato je nomo de SAT., bonvalutaj devizoj en rekom. letero aŭ bankĉeko je nomo de « Bannier ».

Ĉe la sojlo de nova jaro

ANKORAU antaŭ ol finiĝis la jaro 1937, la Plenum-Komitato de SAT decidis, post zorga ekzameno de la financa k materiala flanko, efektivigi la jam longe nutritan deziron de multaj Gek-doj : ĝi decidis pligrandigi SENNACIULO-n je *DU PAĜOJ*, tamen ne postulante pli da mono el la poŝoj de la legantoj.

La decido efektiviĝis ekde la novembra numero. Kompreneble, la P.-K. karesis kun sia ekpaŝo la esperon, ke tiu pligrandigo de la gazeto alkondukos al ĝi bukedon da novaj amikoj en la tuta mondo. Ĝi pensas, ke la pli granda amplekso de « S-ulo » pliigos grave ĝian varboforton k tiun de la Asocio, kies oficiala organo ĝi estas : SAT.

La pli ampleksa SENNACIULO estas bazita sur kalkuloj, certe, — ĉar ni ne volus fari senrespondecan paŝon ; sed ĝi precipe tamen estas bazita sur ideaj konsideroj : povi servi pli utile, pli efike al nia granda celo, distrumpeti pli laŭte nian idealon en monda skalo, interligi pli firme k pli intime nian grandan, tutmondan amikaron.

Same granda kiel ĉe la fondo de SAT estas hodiaŭ nia optimismo. Tiutempe tamen ni estis pli naivaj, ni tieldire estis junaj nespertuloj. Sed intertempe ni faris gravajn k, parte, tre dolorigajn spertojn. Hodiaŭ ni restas plue optimistaj koncerne la disvolviĝon de nia movado, sed, eble, tiu ĉi nuna optimismo ne tute similas tiun el la fonda epoko de SAT. Ĝi ja baziĝas ne sur naiva k iluziema impetado de nespertintoj, sed sur la trankvila k prudenta konsiderado de elprovitoj, de harditoj...

Ho, kiom la ventego skue tremigis la mastojn de l'ŝipo, kiom la ondegoj en freneza senkateniĝo per sia malsprita maso krakigis ĝian fundamentan trabaron, ĝin preskaŭ disbatante, k pasaĝeroj transbordiĝis multnombraj en tiuj horoj, estis englutataj de l'avida elemento ! Sed eltenis la ŝipanar', k jam sur trankvila maro pace balanciĝas la boat'. Nova aŭroro orumas ĝian larĝan ferdekon, sur kiu homoj el ĉiuj zonoj de l'terglobo aspire etendas siajn brakojn al malproksimaj horizontoj...

REPAGU VIAJN KOTIZOJN K ABONOJN AKURATE, POR EVITI INTERROMPON EN LA GAZET-EKSPEDO!

Infankomunuma gvidanto pri Esperanto

(Ekstrakto el radioparolado farita nederlandlingve de *C. Buken* (Boeken), gvidanto de la infankomunumo « La Laborejo » *(De Werkplaats)* en Bilthoven, Nederlando, por F.L.E., la 2-an de oktobro 1937.)

... Estas du specoj de homoj inter ni : Estas homoj kiuj eksterenpensas, kiuj eksterenvivas, kiuj la realon kun ĉiuj ĝiaj nuancoj alproksimiĝas tra sia individua ekzisto. Tiuj estas la « diverĝantoj » kies pensado k agado « diverĝas » el ilia individueco, « disiĝas » al ĉiuj flankoj.

Kaj estas la internen-pensantoj, la internen-vivantoj, kiuj elirante de si mem, la individuon alproksimiĝas en la granda tuto k sin mem objektivigas en la universo. Tiuj estas la « konverĝantoj » kies tuta esto havas la inklinon per pensado k farado direkti sin al la celo.

Sed feliĉe ankaŭ estas iuj malmultaj, kiuj konvinkiĝis, ke el la renkontiĝo de tiuj du pens- k vivdirektoj en la realo devos naskiĝi la nova vivo, kiu ĉiujn k ĉion unuigas. Tiuj estas la kunigantoj, la « sintezantoj », tiuj estas la viv-artistoj, kiuj kreas kulturon.

Kiam mi estis juna, mi — tipa diverĝanto denatura — elpensis mondlingvon logike konstruitan el kiom eble plej malmulte da elementoj. Multaj diverĝantoj estas farintaj tion. Kaj estas multaj konverĝantoj, kiuj mondlingvon — kiun ankaŭ ili sentas necesa — atendas kiel donacon de ekstere, de supre, kiel la araboj kredas, ke ilia lingvo estas donita al ili kiel ĉiela donaco.

Sed ankaŭ estas tiuj, kiuj kredas, ke la lingvo, kiun ĉiuj iam parolos k komprenos, devas esti tia, ke ĝi ambaŭ kosmajn direktojn enhavas : ke ĝi estu elpensita de unuopulo k samtempe kreita pro ĝenerala bezono.

Estas preskaŭ neniu en Nederlando k en la plej multaj aliaj landoj, el homoj kiuj havas antipation pri milito, k kiuj ne vidus la urĝan postulon, ke la homaro pace vivu. Unu el la unuaj por tio necesaj rimedoj estas, ke *reciproka prudento de la gvidantoj* k *reciproka kontakto por ĉiuj estu ebla.* La diverso de l' lingvoj plimalfaciligas ambaŭ. Kiu, kiel mi, mem spertis, kiom reciproka kontakto k kompreno estas malebligata, kiam homoj el diversaj landoj estas kune, scias, ke estas urĝa postulo, ke estu trovata lingvo, kiun ĉiuj povas lerni, paroli k kompreni.

Ĉu latino ? Tro malfacila. Ĉu angla aŭ franca, germana aŭ rusa ? Kial la influo de iu kulturo estu arte plifortigata, kompare al aliaj kulturoj ?

Ne, mondlingvo, kiu iam de ĉiuj estus akceptata, devas esti neŭtrala perilo, kiun ĉiuj povas uzi, sen la sento, ke ili malutilos la propraĵon.

Kiel mi jam diris, mondlingvo ne nur devas esti elpensita ; sed ni ankaŭ ne povas esperi, ke ĝi perfekte falos el la ĉielo. Ĝi devas esti sinteze formita, sufiĉe originale elpensita, sed ankaŭ sufiĉe bazita sur la ekzistanta materialo. Tiujn postulojn kontentigas esperanto. La malfacilaĵoj de lernado k elparolado ankaŭ devas esti kiel eble plej malgrandaj. Tiujn postulojn kontentigas esperanto. Kiel eble plej baldaŭ la unua k plej malfacila periodo devas esti venkita, ĝis kiam en ĉiuj landoj estas grupoj, kiuj skribas k parolas la lingvon. Ankaŭ tiun postulon kontentigas esperanto...

Fakte mi ne rajtas paroli pri praktikado de esp-o, ĉar mi mem pro troa labor-okupo la lingvon ankoraŭ ne sufiĉe scipovas, sed, ĉar oni min petis diri ion pri tiu temo, mi faras tion kun impertinento ; mi ja laŭpovo kunhelpis k volas kunhelpi por alproksimigi la tagon, kiam ĉiuj infanoj la kutiman instruadon komencos per la lernado de esp-o...

Pro tio en « La Laborejo », Infankomunumo en Bilthoveno, esp-o estas la unua deviga fremda lingvo por la plej junaj infanoj. Ĉar la gramatiko estas tiel logika k facila, ne konas esceptojn k ĉar ĉiuj litersignoj ĉiam same estas elparolataj, la infanoj lernas esp-on facile k plezure, k ekde la komenco ili jam povas korespondi kun infanoj kie ajn. Cetere esp-o estas bona fundamento por la studado de aliaj fremdaj lingvoj... Tial la ĝenerala lingvo, ĉe ĉiuj laboroj en la centra domo (manlaboro, arto, ĝeneralaj kunvenoj k lekcioj), devos esti esp-o.

Tiele la infanoj, kiuj venos el diversaj landoj (nia celo estas grupo el 500) povas lerni komunvivi k kunlabori. Ili vidos en la praktiko la valoron de internacia lingvo. Kaj — laŭ tio kion mi jam spertis tiurilate — mi ne dubas, ke esp-o pruvos sian taŭgecon por tiu celo...

Mi vere esperas, ke esp-istoj ĉie pli k pli interesiĝos pri la laboro de la Internacia Infankomunumo en Bilthoveno k nin helpos demonstri al la tuta mondo, ke per esp-o grupoj da infanoj el ĉiuj popoloj k

tavoloj povas unuiĝi en bone ordigita k harmonia komunumo...

... Estas ja neeble nei — kio cetere ne estas miriga — ke nia socio en ĉiuj landoj ankoraŭ nun estas regata de la konverĝa pensado k ke la diverĝo estas ĉu subpremata aŭ, en la plej bona kazo, tolerata malplimulto. Estis tiel dum la tagoj, kiam la herezuloj estis bruligataj; estas nun tiel ke la individuistoj, kiuj ne povas esti kontentaj pri la reganta reĝimo, ekĝemas en malliberejoj k koncentrejoj, aŭ kiel « Brand » de Ibsen en la izoleco de ĉiama glacikampo trovas sian vivfiniĝon. Tio estas neevitebla, kiom longe tiuj, kiuj havas la povon por regi — la konverĝaj, t. e. la vire pensantaj — ankaŭ sole havas la gvidadon en manoj.

Oni opiniis, ke ĉi tiu malfacilaĵo povus esti solvata per dono de voĉdonrajto al la inoj. Sed oni ne vidis, ke sence per tio nenio aliiĝus, ĉar la inoj laŭ tute vira maniero devus agi : ili estis k estas forŝirataj el la tipe ina sfero (ĉu ludado kun la suĉinfano, ĉu adorado en la monaĥinejo) por fari tipe viran agon : per la voĉo regi.

Ne, tio kio estas necesa, estas io tute alia : Per la ĝenerala voĉdonrajto nur kolektiĝis la viraj viroj k la viraj inoj en unu estraro. Kion la mondo atendas, tio estas la unuigo, la sintezo de la kosma-vira k la kosma-ina elemento, kio estas trovebla ĉe ambaŭ seksoj.

Estri, regi ne estas sufiĉe. La sintezo, la kunfandiĝo devas esti trovata inter tio, kio sin el la individuo malvolvas, kaj inter tio, kion la tuto postulas! Kaj tio estas la arto lernota.

Certe, la unuopulo devas sin klini antaŭ la postulo de la forto, kiu lin devigas. Li silentos, — verŝajne timante la teroron — sed kion li iam devos fari estas sin *korinkline* fleksi antaŭ la postulo de la tuto, *sin doni*, sed tiam ankaŭ *al la tuto!*

Kaj ĝuste al tia eblaĵo oni ne kredas. Oni ne komprenas, ke estas eble, ke iam ĉiuj individuoj en ĉiuj landoj atingos tion. Pro tio oni estas kontenta komenci per io malpli ol *la Tuto*. Oni komencas per « *grandega tuto* », per sia ŝtato, sia eklezio, sia partio k obeas blinde k perfekte.

Sed tiu sindonado estas sindonado al malpli ol la granda Tuto k nepre devas gvidi al kunpuŝiĝo de ĉiuj sentoj tiam aperantaj. Tiam stariĝas ŝtatoj kontraŭ ŝtatoj, eklezioj kontraŭ eklezioj, partioj kontraŭ partioj. Ili kunpuŝiĝas, devige, k bedaŭrinde granda parto el la vivenergio k flegado de ĉiuj estas uzata por intermiliti...

Tio koncernas ankaŭ la problemon de mondlingvo — multaj homoj konkludas, ke estas pli bone akcepti ekzistantan lingvon kiel mondlingvon. Multaj diras : Estas jam mondlingvo la angla. Kial klopodi krei novan, aŭ voli enkonduki ĝin?...

... Antaŭ nelonge vizitis nin en nia Bilthovena Infankomunumo, anglohindo venanta el « Ashram » de Tagora, s-ro Sinha. Li faris studvojaĝon por la slojdo al Svedio. Sed montriĝis, ke li per sia angla lingvo tie nenion povis komenci. Li decidis tiam unue lerni esp-on k post nur 2 *monatoj* li ekiris, parolis tra la tuta lando kun instruistoj, en kunvenoj, komprenis k estis komprenata!

Ni laboru por tio, ke kiel eble plej baldaŭ esp-o kiel deviga instrufako estu instruata en la lernejo aŭ lernejoj, en kiuj ni povas influi.

Tradukis MOHO.



Adreso de la O.K.K. :

Por Mono: K-do G. Basteels, 26, rue du Parnasse, Bruxelles-XL, Poŝta ĝirokonto : 332.15.

Por ĉio alia: K-do L. Strainchamps, 148, Av. du Roi, Bruxelles-Ft.

2-a KOMUNIKO

Kotizo: La kongreskotizo estas 40 belgaj frankoj. — Por frualiĝontoj (antaŭ 1. junio 38) : 30 belg. fk. Por senlaborul-oj : 20 belg. fk. (frualiĝontaj senlaboruloj 15 bg. fk.).

Loĝado: Ni planas kiel eble plej zorge k kontentige plenumi ĉi tiun servon per hoteloj, privataj loĝejoj, tendejo, uzo de « Junulara Gastejo » k per organizo de amasloĝejo. Sed por ke ĉio glate organiziĝu, nepraj kondiĉoj estas : **frua aliĝo** k zorga **plenigo de la aliĝiloj.**

Adresoj: Oni atentu la adresojn de la O.K.K. Monon oni sendu per poŝtmandato aŭ ĝiro, al la kasisto. Ankaŭ uzeblaj estas la poŝtĉek-kontoj de SAT en la diversaj landoj.

Vojaĝo. El Francio. Ni ricevis la informojn pri la rabato, kiu estas 40 procentoj. Por akiri la rabaton la kongresanoj devos esti minimume dudek. Familianoj de la membroj povas ankaŭ akiri la rabaton, sed ne nombriĝos por la kalkulo de la minimumo. Ĉar la organizantoj de la kongreso devos fari oficialan mendon unu monaton antaŭ la kongresdato, estos necese, ke niaj francaj K-doj sendu siajn aliĝojn pli ol unu monaton antaŭ tiu dato.

El Svedio: Ni jam povas anonci 25-procentan rabaton por minimume dek kunvojaĝantoj. Ni klopodas akiri pli da detaloj por tiu lando.

El Britio: K-do **Joel Sulsky,** 6, Church Str., **Luton,** projektas baldaŭ organizi sufiĉe grandan karavanon.

Por Belgio: Ni ne povas anonci la rabatprezon konsentotan al la kongresanoj, la Nacia Societo de belgaj fervojoj studas nun la novajn prezojn por la venonta jaro. Tuj post ricevo de la informoj ni konigos ilin.

Por belgianoj: Por ebligi al senlaboruloj la aranĝon de biciklaj karavanoj, ni petos STAMPLIBERIGON dum unu semajno.

Al la S.A.T.perantoj! Ni vokas al la lokaj k landaj perantoj, por ke ili iniciatu karavanojn (per fervojo aŭ biciklo) k « porkongresan ŝparkason ».

Glumarko. La O. K. K. presigis belan glumarkon (dukolora) 3 × 4 cm. Prezo : 5 bg. fk. por 100 ekzempleroj. Mendu ĉe la kasisto. Multe propagandu.

Por la O.K.K.: La sekretario.

DUA LISTO DE ALIĜINTOJ

12. K-do L. Banmer, Parizo ; 13. E. Barrow, Parizo; 14. L. Glodeau; 15. K-dino S. Glodeau, Parizo; 16. N. Bartelmes, Parizo; 17/18. G-doj A. v. d. Pols, Roterdamo; 19. K-do J. Derieuw, Antverpeno.

Ĉe la Laboristaj Esperanto-Asocioj

XI-a KONGRESO DE S.L.E.A.

La jara kongreso de l'Sveda Lab. Esperanto-Asocio okazis la 11-an k 12-an de septembro en *Huskvarna.* Proksimume 325 personoj ĉeestis la antaŭirantan vesperfeston, en kiu la kongreson salutis reprezentantoj de 17 fakaj k 14 esp-istaj organizoj. K-do *E. Eriksson,* la prezidanto de SLEA, faris la festparoladon. Du teatraĵetoj estis prezentataj de anoj de la klubo en Boras. Monkolekto por Hispanio rezultigis 62,11 kronojn. La kongreso solvis diversajn ĉefe organizajn problemojn (rilate kotizon, lekciiston, solidaron kun la hispana popolo, aranĝon de somera tendaro venontjare en Orebro, elekton de l'Plenumkomitato). La venontjara kongresurbo estas Trollhättan. (Laŭ « *Arbetar-Esperantisten* »).

LA POZICIO DE DANA L.E.A.

La gazeto de la komunista frakcio en SAT « Raci' nin vokas » eraras, asertante, ke D.L.E.A. nun laŭstatute permesas al siaj membroj aliĝi al SAT, IPE aŭ ISE laŭplaĉe. DLEA forigis paragrafon pri akcepto de la socialdemokrata partiprogramo ; sed la prezidanto de DLEA forte akcentis (en la lasta jarkunveno) nian amikecon al SAT. Povas esti, ke DLEA ne eksigas eventualan IPE- aŭ ISE-anon (se tiu ĉi ne ĝenas nian laboron), sed kiel organizo ĝi rekomendas nur SAT k respektas la Gotenburgan Konvencion.

H. P. Frodelund (Ĝen. Konsilanto).

POR ŜTOPI LA BREĈON

61. Listo

Erbaro, Paris	fr. fr.	10.—
M. V. Aelst-Ch. Faure	b. fr.	8.50
J. Wild, Zürich	sv. fr.	10.—
H. Siesem, Amsterd	guld.	0.70
K-dino Derlagen, Oostzaan	»	0.60
A. Ŝvingshakl, Klagenf	aŭ ŝil.	2.55

La Unueco en Francio

LA SPERTOJ EN LA SINDIKATA MOVADO

Ni publikigas tiun ĉi artikolon en « S-ulo », ĉar la demando pri unueco ja ankaŭ okupas nin kiel laboristajn esperantistojn. La dua parto de tiu ĉi artikolo (traktonta i.a. pri la Lab. Esp. Movado en Francio) fariĝos pli komprenebla post lego de la ĉi-sekva skizo. Okaze de la dua artikolo ni intencas memorigi al la legantoj ankaŭ la « Principojn de Unueco », kiuj gvidas nian laboron en SAT. — *Pl. Kom.*

Pritraktante la unuecan'temon en sia jarraporto, la Plenumkomitato de SAT aludis pri la spertoj faritaj en la reunuigitaj laboristaj organizoj en Francio. Ĉar la problemo estas ĉiam aktuala, mi opinias interese informi niajn eksterlandajn K-dojn pri la nuna situacio.

La fiaskinta ribelo de la francaj faŝistoj, la 6-an de februaro 1934, vekis la dividitan laboristaron. La diverstendencaj proletaj organizoj kuniĝis por komuna agado kontraŭ la faŝista minaco. Iom post iom sentiĝis la bezono plifortigi la agad-unuecon, k stariĝis la demando pri reunuiĝo de la sindikatoj.

Oni scias, ke tiam ekzistis du Ĝeneralaj Konfederacioj de l'Laboro : C.G.T., la malnova, k C.G.T.U., komunistema, nomiĝanta « unueca ». Komence, ĉi lasta, preskaŭ tiom forta kiom la alia (ambaŭ havis ĉ. 450.000 membrojn), grupigis ne nur komunistemulojn, sed ankaŭ revoluciemajn sindikatistojn, kiuj trovis ne sufiĉe batalema, tro oportunisma la sintenon de la CGT- ĉefgvidantoj. La iom-post-ioma konkero de ĉiuj gvidaj postenoj en C.G.T.U. fare de la ortodoksaj komunistoj foririgis preskaŭ ĉiujn nekomunistajn laboristojn aŭ sindikatojn. Multaj realiĝis al la malnova C.G.T. ; kelkaj sindikatoj k sindikataroj organiziĝis en aŭtonomaj Federacioj (ekz. la ŝtatoficistoj). Tiel C.G.T.U. perdis proksimume la duonon de sia membraro.

Fine de septembro 1935 ambaŭ C.G.T. kongresis aparte. Interkonsento okazis pri la cirkonstancoj de la reunuiĝo. Interalie la rezolucio akceptita de la CGT-Kongreso la 26. sept. *kondamnis la frakciojn k frakcian laboron* (tiurilate, la CGTU-kongreso esprimis sian prifundan konsenton, kvankam ĝi opiniis la frazon tro kruda). Kaj ĝi proklamis, ke la unueco estas restarigota *sur la bazo de plena sendependeco de l'sindikatismo.* Pri tio estis unuanimeco.

Post la komuna kunsido de ambaŭ kongresoj, la kuniĝoj de sindikatoj k sindikataroj rapide efektiviĝis. La Nacia Unuiĝa Komitato elektis, la 28.1.36, la provizoran estraron de la nova CGT : 6 eks-CGT-anojn, 2 eks-CGTU-anojn.

La unuiĝa kongreso okazis en Tuluzo (Toulouse), la 2./6. marto 1936. Triumfis la konceptoj de la malnova CGT pri sindikatisma strukturo per 5700 voĉoj (2628 sindikatoj) kontraŭ 2609 voĉoj (1112 sind.), 141 sindetenoj (51 sindikatoj) ; pri malpermeso okupi samtempe politikan k sindikatan gvidpostenon, per 5508 voĉoj (2569 sindikatoj) kontraŭ 2411 voĉoj (1031 sind.), 132 sindetenoj (41 sind.) ; pri aliĝo al la Internacia Sindikatara Federacio, per 5463 voĉoj (2566 sindikatoj) kontraŭ 2513 voĉoj (1051 sind.), 243 sindetenoj (82 sind.).

La Kongreso unuanime aprobis la popolfrontan programon, k kiel komplementon, la Planon de C.G.T. (1). La Nacia Konfederacia Komitato, kiu tuj sekvis la kongreson, elektis la CGT-estraron, konsistanta el 6 eks-CGT-anoj k 2 eks-CGTU-anoj.

La restarigo de unusola CGT estis entuziasme akceptita de ĉiuj klaskonsciaj laboristoj. Certe ĝi tre helpis la sukceson de la amasa strikmovado dum majo-junio 1936. Ankaŭ ĝi ebligis la konsistigon de potencaj sindikatoj, ĉar milope, eĉ milionope, la laboristoj venis al CGT. De marto 1936 ĝis marto 1937, ĝia membronombro pasis de 1 miliono al preskaŭ 5 milionoj. Nun ni havas potencan organizon, kiu kapablas venke kontraŭstari faŝismon k la diversajn manovrojn de la mastraj sindikatoj penadantaj por nuligi la belajn konkeraĵojn de la lastjaraj strikoj.

Sed por tio ne sufiĉas, ke ni konservu la organizan unuecon. La spirita estas ankoraŭ pli necesa. Ĝin esperigis al ni la digna sinteno k la decidoj de la Tuluza kongreso. Bedaŭrinde, de unu jaro aperis grava minaco al ĝi : la taktiko uzata de la komunista partio por forpeli de la gvidaj postenoj ĉiujn eks-CGT-aktivulojn, kun kiuj oni akceptis momente kunlabori. La tielnomita « koloniigo » de CGT. estas faciligita de la manko de sindikata eduko ĉe la novevarbitoj. La cito de kelkaj gravaj faktoj montros, ke mi ne faras senpruvan aserton.

Unue ni konstatu du malobeojn al la kongresdecidoj : 1) Kvankam la frakcioj k frakcilaboro estis kondamnitaj, eks-CGTU-anoj daŭrigas aperigi, prezentante ĝin kvazaŭ oficialan organon de CGT., sian semajnan gazeton « La Vie Ouvrière » (Laborista Vivo) *ekster la kontrolo de l'C.G.T.-estraro.* Ĝi konsistigas tendencan organon je la servo de politika partio. Por kontraŭbatali ĝian propagandon k defendi la laŭstatutan sendependecon de la sindikata movado, sindikatistoj kreis en oktobro 1936 alian semajnan gazeton « Syndicats » (Sindikatoj). 2) Malgraŭ la malpermeso okupi samtempe sindikatan k politikan postenon, depost la lastjaraj balotoj, 8 komunistaj deputitoj (1) k kelkaj membroj de la komunista parti-estraro okupas postenojn en gravaj sindikatoj aŭ sindikataroj.

La manovroj komenciĝis okaze de la reelekto de sindikataj administrantaroj. En novembro 1936 la estraro de la metallaborista sindikato — plimulto komunista — por « orienti » la diskutadon rilate la preparon de sia parizregiona kongreso, sendis al siaj sekcioj cirkuleron konsilantan, ke la voĉdonoj en la fabrikaj sekcioj okazu : « por la eks-CGTU-pozicio (klasbatalo) », aŭ « por la eks-CGT-pozicio (klaskunlaboro) ». Estas notinde, ke tiuj esprimoj havas nun nenian signifon, ĉar en CGT-estraro ĉiuj decidoj estas alprenitaj unuanime, k eks-anoj de ambaŭ CGT. kunlaboras en Internacia Labor-oficejo k en la Ekonomia Konsilantaro. Ambaŭ akceptis la kolektivajn kontraktojn k arbitracion (kiujn CGTU. iam kontraŭstaris pro tio ke ili rompas la laboristan batalemon), k la Popolfrontan programon entenanta aron da « reformoj » en la kadro de la kapitalisma sociordo. Cetere, ĉiurilate la komunista partio havas tute oportunistan pozicion.

En januaro alispecaj manovroj en kelkaj organizoj : bakista k serurista sindikatoj, Sindikatara Unuiĝo de Seine-departemento. El la oficiala kandidatlisto, kiu entenis duoble pli da nomoj ol estis da postenoj, komunistoj starigis liston de siaj preferataj kandidatoj k publikigis ĝin en la kom. gazeto « Humanité », konsilante voĉdoni por ĝi. Okazis plendoj al CGT., kies estraro alvokis cirkulere al ĉesigo de tiuj mallojalaj agoj.

Vana estis la admono. En la kongreso de la departementa Unuiĝo (1) de Mar-Alpoj, oni elpensis alion : Kiam jam 400 delegitoj estis for, tutfine de posttagmeza kunsido, oni decidas kunveni nokte. Kaj dum tiu kunveno, oni elektas la estraron, forigante la sekretarion, eks-CGT-ano, kies agadraporto estis unuanime akceptita matene. Proteste komunista estrarano publike malaprobis en parti-eksiĝa letero la enmiksiĝon de la Partio en la sindikataj aferoj.

Paralele al la manovroj oni uzas kalumnion. Unu ekzemplo el multaj : la Bulteno de la Tipografa Sindikato Pariza (dec. 1936) entenas jenan fakton : en la « Cahiers du Bolchevisme » (Kajeroj pri Bolŝevismo), 1. okt. 1936, iu redaktoro skribas, ke K-do Rimbert, membro de la linotipista komisiono, estas konata kiel policistaĉo. Apogante la proteston de la koncerna K-do, la sindikata konsilantaro postulis ke la citita revuo pruvu la akuzon. Kompreneble tio neniam estis farita. Tio ne malhelpis, ke okaze de la memmortigo de la ministro Salengro, la komunista gazeto « Humanité » senhonorigis la kalumnion !

En la sindikatoj gvidataj de eks-CGTU-anoj la parollibero ne plu estas ebla al la eks-CGT-anoj ; ofte antaŭ ol ĉi tiuj ekparolu en fabrikkunvenoj, bruego malpermesas ilin aŭdiĝi. Tiurilate plej elokventa fakto estas jena :

Verkinte kelkajn artikolojn kontraŭ stahanovismo, K-do Kléber Legay, sekretario de la Franca Federacio de la Minist-

---

(1) La « plano » de la malnova C.G.T. entenas tielnomitajn strukturajn reformojn, kiujn la Komunista k Radikala Partioj rifuzis enkonduki en la Popolfrontan programon ; deziras ilin la Socialista Partio k la « Socialista-respublikana Unuiĝo » (novsocialistoj k.a.).

(1) Nur unu socialista deputito estas sekretario de sindikatara federacio (Agrokulturo).

(1) Ĉiuj sindikatoj estas loke grupigitaj en lokaj unuiĝoj, kiuj konsistigas en ĉiu departemento unuiĝon. Krome la diversfakaj sindikatoj de sama industrio konsistigas por la tuta lando industriajn sindikatarajn federaciojn.

oj, delegito por la minista sekureco, estis invitita de la nordregiona sekretario de « USSR-Amikoj », viziti Sovetion ; ĉi tiu promesis al li plenan liberon por vidi k enketi. Kun kelkaj estraranoj de la minista federacio, inter kiuj ĝia sekretario K-do Vigne, K-do Legay partoprenis sindikatan delegitaron, okaze de la lastjara datreveno de la Oktobra revolucio. Kvankam li ne povis, kiel promesite, libere enketi, li tamen vidis sufiĉe por konstati la malaltegan vivnivelon de la sovetiaj laboristoj apud la lukso de la burokrata klaso, k la malbonajn laborkondiĉojn de la ministoj. Opiniante, kiel Ĵores (Jaurès), ke la vero ĉiam servas la proletaron, li diris ĝin en kelkaj artikoloj en socialista gazeto nord-regiona k en libreto antaŭ nelonge eldonita. Pro tiu krimo : esprimi liberan opinion ekster la sindikataj rondoj, K-do Legay estas nun insultegata ; la profesiaj kunvenoj kie li estas anoncata kiel oratoro, estas sabotataj, eĉ la nordregiona komunista gazeto postulas, ke li estu forigita de sia posteno en la minista federacio.

Sed la komunistoj, male, ne perdas okazon miksi Sovetion al la sindikataj aferoj : en la agadraporto verkita de K-do Hénaf, por la Kongreso de la Sindikatara Unuiĝo de l'Seine-departemento (5/7. febr. 1937), oni trovis laŭdajn vortojn al Sovetio, kiuj naskis tiom akran diskuton dum la kongreso, ke la raportinto devis retiri ilin por ebligi unuaniman voĉdonon.

Mi ne povas fini tiun ĉi raporton, ne parolante pri la ĝenerala striko de la metallaboristoj parizregionaj. Lastatempe la gvidantoj de tiu sindikato decidis, nedemandinte la membrojn, unutagan ĝeneralan strikon por protesti kontraŭ la malrapido de la arbitraciaj decidoj rilate la salajroplialtigojn, kontraŭ la neplenumo de la promesoj faritaj de la registaro al la laboristaj organizoj, kontraŭ la malrespekto al la sindikata rajto, k por postuli la malfermon de la franc-hispana landlimo. Kelkaj gvidantoj de la konstrulaborista sindikato subtenis la projektitan movadon, oni klopodis por akceptigi ĝin de la CGT. k de la Seine-sindikatara Unuiĝo. Ĉar la arbitracia decido, alprenita post 4-monata atendo, estis jam konata k akceptita, ŝajne la striko havis ĉefe politikan celon ; ĝi estis direktita kontraŭ la registaro — aparte kontraŭ la ministro por eksterlandaj aferoj — k un tamen subtenas per siaj voĉoj la du komunistaj deputitoj, kiuj estras la metallaboristan sindikaton. Tiu enkonduko de politika postulo inter profesiaj naskis fortan polemikon. Finfine la sindikato ŝanĝis sian projekton en unuhoran strikon proponitan de la komitata malplimulto.

Mi ĵus aŭdis de K-do, kiu apartenas al la plenumkomitato de la metallaborista sindikato de l'parizregiona urbo Argenteuil jenajn sciigojn : « Unuanime la CGT-estraro malaprobis la strikprojekton ; la sindikatanoj — nedemanditaj — malaprobis ĝin ankaŭ ; tamen ili obeis la ordonon pro sindikata disciplino. Ĉirkaŭ 300 sindikat-aktivuloj k laborejaj delegitoj perdis sian okupon pro tiu striko. La sindikata gazetaro silentis pri tio, ĉar la sindikato ne estis kapabla kontraŭagi. La maldungitoj tuj retrovis okupon en la naciigitaj militilaj fabrikoj, kie la laborejaj delegitoj kontrolas la dungiĝojn. Restas atentinda fakto: multaj laborejoj estas senigitaj de la laŭleĝaj delegitoj, k estas malfacile trovi aliajn pro la risko perdi sian laboron. En kelkaj sindikatoj la tendencobatalo estas tiom akra, ke en ilia administrantaro la membroj rilatas tute malamike. » Tiu K-do konkludis, ke « nun amasa striko simila al la lastjaraj strikoj estus pro tiu spiritostato tute neebla. » Tio estas tre grava, ĉar la kolektivaj kontraktoj estas nun renovigotaj en multaj industrioj, k certe la batalo por nur konservi la akiritaĵojn estas tre malfacila. Pli ol iam la laboristoj bezonas tutan unuecon.

Jam de la komenciĝo, la enmiksiĝo de politika partio en la sindikataj aferoj okupis la atenton de la CGT-estraro. Ĝi dissendis du cirkulerojn al la sindikataroj (15. jan. k 22. julio 1937), atentigantajn pri la danĝero, kiun prezentas tia enmiksiĝo por la spirita unueco de la sindikatoj k memorigantajn pri la kongresdecidoj.

La Nacia Konfederacia Komitato, kiu kunvenis fine de lasta aŭgusto, debatis pri la sindikata « koloniiĝo » k esprimis la deziron, ke la CGT-estraro klopodu ĉe la partioj, por ke ĉesu ĉiuj manovroj celantaj kontroligi de politika partio la sindikatan movadon. Ankaŭ K-do Ĵuho (Jouhaux) akceptigis la deziresprimon, ke kuniĝu la du semajnaj sindikataj gazetoj, kiuj aperas nun ekster la CGT-kontrolo, en organo kontrolota de CGT. « Syndicats » akceptis, sed la « Vie Ouvrière » rifuzis. Tio montras la evidentan deziron daŭrigi la frakcian laboron komencitan. Cetere la komunistaj gvidantoj fieras pri ĝi. En julia kunveno de la parti-estraro, K-do Arrachart deklaris : « Tio, kio estis farita sur la sindikata grundo, povas esti farata sur la politika. » Sed tie renkontiĝas forta rezisto...

En alia artikolo mi parolos pri la politika unueco k pri la spertoj faritaj en la franclingva L.E.A.

H. Cachon (Kaŝon) (24),
eks-sekretario de F.E.O.

Ne ankoraù ekzistas mondlingvo

Ĉe lego de ĉi tiu titolo verŝajne kelkaj legantoj skuetos la kapon, pensante, ke la subskribinto de ĉi tiu artikoleto estas malsaĝa aŭ, en la plej bona kazo, malsprita ŝerculo. Tamen la faktoj ĉiutage pruvas, ke esp-o, kia ĝi estas uzata en la praktiko, ne tute solvis la problemon pri tutmonda interkompreniĝo.

En nia esp-ista vivo tra multaj landoj mi plurfoje havis la okazon konstati, ke ne sufiĉas elparoli la nomon de *objektoj* per la samaj sonoj por atingi kompletan interkompreniĝon. Necesas ankaŭ fari la samon pri propraj nomoj. Mi citu nur unu tipan ekzemplon. Foje oni demandis min pri « K-do Bo-u-bo-u » (prononcata en 4 silaboj). k mi respondis, ke tiun personon mi tute ne konas k eĉ la unuan fojon aŭdas tiun nomon.

— Vi ne konas ? mirigite aldonis la demandinto, sed li estas via samlandano k tre aktiva en la movado...

— Bonvolu skribi tiun nomon, mi petas.

Tiam mia kunparolinto elpoŝigis sian krajonon k skribis : « Boubou ».

— Nu, jes, mi konas, sed vi devus elparoli : « bubu ».

Kompreneble ni ambaŭ ridegis ĉe la konstato, ke nacilingva ortografio k ĝia esp-a prononco povas tiom malsimili...

Estus malsaĝe kredi, ke tia demando estas neniel grava k nur amuza. Fakte en la estonto propraj nomoj pli k pli estos uzataj en nia lingvo. Kaj jam nun, okaze de la « incidento » (jure milito ja ne ekzistas !) ĉino-japana, disaŭdigejoj spertas grandajn malfacilojn, rilate al propraj nomoj. Ateston pri tio mi trovis lastatempe en anglalingva ĵurnalo. Jen ĝi estas :

« ... La informistoj de B.B.C. havas siajn proprajn premsonĝojn pro la ĉin-japana konflikto. En la komunikoj por ĉiu nova bulteno ili devas elparoli la nomojn de japanaj k ĉinaj urboj k vilaĝoj, tiujn de generaloj, ŝtatistoj ktp. k ili konstatas, ke tio estas ekster ilia kapablo. Ĉefe la japanaj nomoj kaŭzas la plej grandan ĝenon, tial ke la informistoj ne estas familiaraj kun la japanaj vokaloj k ne komprenas la simplan fakton, ke la silaboj ne estas akcentataj. Specialaj atentigoj estas faritaj al la ambasadorejoj de ambaŭ landoj koncernataj k ankaŭ al kompetentuloj... »

Tiurilate la esp-istoj havas nenion konkretan por proponi. La problemo pri tutmonda interkompreniĝo restos nesolvita — eĉ principe — ĝis la propraj nomoj estos esperantigitaj k publikigitaj kun aldonaj mapoj koncerne la geografiajn. Dume la SAT-anoj povus instige helpi al la solvo de tiu problemo per la esperantigo de sia propra nomo. Estas plorinde, ke en Esperantio troviĝas ankoraŭ tiom da homoj, kiuj trudas sian naciecon per tabueca respekto al nacia ortografio. Sendube tiaj naciistoj emos tuj rebati, ke en esp-o mankas literoj, por transskribi tute *precize* sian nomon. Nu, sed tiu precizo tute ne necesas. Sufiĉas, ke en Esperantio ĉiu sciu, ke tiu aŭ alia persono nomiĝas per tia aŭ alia kombino el esperantaj literoj aŭ sonoj.

Evidente Esperantio ankoraŭ ekzistas nur pli malpli ideale, kvankam troviĝas jam esp-istoj en ĉiuj partoj de l'mondo. Ne eblas ignori la realaĵojn, la naciojn kun iliaj leĝoj ktp. Ne eblas malatenti la impostkolektiston... Sed en neniu lando estas malpermesite havi « plumnomon », pseŭdonimon. Tiajn havas multaj verkistoj. Volter laŭleĝe sin nomis Arue (Arouet). Se esp-istoj sennaciecigus sian propran nomon, tio estus signo, ke ili celas konduti esperantiste en Esperantio. Ĉu tio estas troa postulo ?

Respekto al la nacia formo de sia propra nomo tio estas signo pri konscia aŭ nekonscia naciismo. Propra nomo ja pensigas pri familio, kio estis la unua formo de patrio (1), pri regiono, lando, tradicio k ĉio cetera, kio premŝvebas super la po-

---

(1) Pri tio oni legu en *Naciismo* de E. Lanti (SAT-Eldono).

poloj k konsistigas la spiritan atmosferon, kiu ebligas militojn.

Bagatelaĵo ! kredeble pensos oportunistoj. Eble ! Sed la vivo ĝenerale konsistas el malgravaĵoj. Kiu ne kapablas rilati racie al bagatelo, tiu ankaŭ ne povos konduti saĝe en grava okazo. Kiu povas elporti pezan ŝarĝon, tiun ne ĝenas malpeza. Sed la samo ne estas direbla en inversa propozicio.

« *SAT-anoj celas al sennacieca sent-, pens- k agadkapablo* », estas dirite ekde la fondiĝo de la Asocio. Tiu moto ne devas esti nura surpaperaĵo. Ni ĉiam k ĉiarilate agu racie k konsekvence ; ni montru per nia sinteno antaŭ « malgravaĵoj », ke ni penadas senĉese por formi nian menson konforme al la celo. Tion farante ni helpos laŭpove al la estiĝo de reala mondlingvo.

Narazu Mono.

El niaj leteroj

Ĉu esperanto estas rimedo kontraŭ la terura milito ? Demandinte al mi tion, mi decidis ankaŭ transdoni la demandon al vi, SAT-anaro. Mi tamen samtempe volas doni mian impreson al vi. Laŭ mi, nia lingvo estas tre grava faktoro por liberigi la popolojn el militoj k el la mizero de la nuna klasa socio. Ni jam povas konkludi, ke esp-o estas bonega rimedo kontraŭ la sociaj fuŝuloj. Vi, kiuj jam komprenis la valoron de esp-o, komprenigu ĝin al ĉiuj laboristoj. Por ke en la pensoj de la popoloj malaperu la limokoncepto k aperu la ideo pri frateco, necesas ke ili studu espon. Ĉiu SAT-ano do devus esti propagandisto en sia medio. En la momento kiam minacas nova terura milito, la kapitalistoj ne havu la povon kredigi al la popoloj, ke sur la alia flanko de l'limo staras malamikoj ; nia anaro scias, ke tie estas K-doj, k ne nur tie, sed ĉie en la mondo. Miloj k miloj da K-doj atendas la horon por liberigi sin el la kapitalismo, tuj pretaj doni la manojn al ni, por starigi la veran pacon en la mondo. Poste ni povos plene uzi la produktojn, kiujn ni bezonas por ni k niaj infanoj, k oni nenie plu forbruligos nutraĵon. Kaj la aviadilojn ni tiam ne plu uzos por bombardi urbojn, sed por transporti malsanajn Gek-dojn al la hospitaloj ; same tiel ni uzos la ŝipojn. Ĉion, unuvorte, ni utiligos por organizi la komunan sociordon. Por k per ĉiuj ! Por atingi tion, esp-o certe estas gravega rimedo. Ni laboru jam nun konstante por la pligrandigo de nia organizo, altirante al ĝi pli k pli da batalantoj. Malaperu la landlimoj, estu unu sola popolo en la mondo, ne plu milito, ne plu kapitalismo. Vivu esperanto k SAT !

(H. Riksman, Roterdamo).

UNUIĜU ! UNUIĜU !

Jam de kelkaj jardekoj sonas tra la tuta tero la voĉo naskiĝinta el sopiroj k larmoj de la plej mizeraj de ĉi tiu mondo : « Unuiĝu ! Unuiĝu !... Proletoj de la Mondo, unuiĝu ! » Jam de kelkaj jardekoj miloj da buŝoj ripetas entuziasme ĉi tiujn signifoplenajn vortojn, k plej bonaj k noblaj homoj penegas penetrigi ilin en mensojn k korojn de la ĉiulandaj proletoj k tiel klaskonsciigi k prepari la premegatojn por neevitebla venonta lukto kontraŭ siaj premegantoj.

« Unuiĝu, Unuiĝu »... flustretas senvoĉe al niaj oreloj iu prudenta k saĝa voko, k la neaŭdeblaj vortoj resonas fortege en niaj animoj.

Rakonto pri Unueco

EN granda familio ofte okazis, ke la familianoj estis en malpaco unu kun la alia. Iliaj ideoj estis malsamaj k tio kaŭzis disputojn, kiuj multfoje estis tiel akraj, ke oni ofendis sin reciproke, eĉ korpe oni interbatalis, kiam sinrego ne plu eblis.

Tiu stato malagrabligis la vivon de la familio k kaŭzis gravajn malprofitojn al ĝi, ĉar harmonia kunlaboro forestis.

Estas vere, ke ne ĉiuj anoj samgrade malbonkondutis. Ne, estis granda diferenco en tiu kondutmaniero, ĉar inter ili estis vere pacemaj personoj, kiuj, malgraŭ tio, ke ili uzis la rajton — ĉar tiu rajto ekzistis — konigi siajn opiniojn k kritikon, tamen estis toleremaj rilate la principojn de la aliaj. Ili malŝatis ofendi la aliajn k ili penadis sin regi, kiam la diskutoj fariĝis tro ardaj. Mi kredas, ke la familio estus estinta pli feliĉa, se ĉiuj anoj estus havintaj la prudenton k la toleremon de tiuj lastaj. Sed tiel ne estis. Estis ankaŭ tre fanatikaj elementoj, kiuj konsideris la aliajn stultaj, perfidemaj k ne indaj je aŭskulto aŭ kamaradeca traktado.

Precipe Teodoro, unu el la gefiloj, estis tre kverelema. Li konsideris siajn ideojn pravegaj, kvazaŭ Dio mem enflustris ilin al li rekte aŭ pere de ia sanktigita terloĝanto. Amikojn li ne havis multe, ĉar lia konstanta malbonhumoro k lia disputemo izolis lin de la aliaj. Tio tre ĉagrenis lin k li fariĝis ĉiam pli amara. Li konstatis, ke oni ne multe simpatias kun tio, kion li kun tiom da maltakto diskonigis, k li longe cerbumis pri rimedo uzebla por venki la aliajn. Ĉar li volis venki, li provis altrudi siajn ideojn al la aliaj. Sed tiu tasko ne estis facila, ĉar ankaŭ la aliaj familianoj havis la rajton konigi siajn principojn. Kaj Teodoro komprenis, ke tiu rajto, tiu egala rajto, grave malhelpas lin en liaj klopodoj. Kaj li konvinkis sin mem, ke estas sensencaĵo doni rajton paroli al homoj havantaj ĥimerajn ideojn, kiuj malutilas al la bono de la familio. Ni ne forgesu, ke Teodoro estis tre fanatika k kredis al la absoluta pravo de siaj opinioj.

Perforte li ne povis silentigi la aliajn gefratojn, ĉar potencon, forton li ne havis pro sia izoleco.

Kaj Teodoro elkovis ruzaĵon. Li komprenis, ke li antaŭ ĉio devas ŝanĝi sian agmanieron, ĉar nun sufiĉe evidentiĝis, ke lia taktiko estas plene maltaŭga. Li do fariĝis pli mola en sia konduto, li komencis flati la aliajn, por akiri iliajn plaĉon k favoron. En tio li kompreneble ne tuj sukcesis, sed kiam Teodoro diskonigis tre simpatian ideon, li baldaŭ alproprigis al si la fidon k ŝaton de multaj.

Laŭ lia aserto oni nun jam pli ol sufiĉe kverelis k la mizera situacio, en kiu la familio troviĝas, estas kaŭzita de la malakordo, kiu jam dum multaj jaroj forprenis la okazon fruktodone k harmonie labori. La aliaj ne povis nei tion k ili ĝojis, konstatante la ŝanĝon ĉe Teodoro, kiu en tiuj detruaj interbataloj ĉiam estis la ĉefa pekulo. Kaj ili kun intereso aŭskultis sian fraton, kiam ĉi tiu per bonelektitaj, kelkfoje sentimentalaj vortoj konigis sian proponon por unueca agado. « En unueco kuŝas nia forto ! » li patose asertis, « k ĉiu, kiu rompas la unuecon inter ni, grave pekas kontraŭ la interesoj de nia familio. Ni ne plu ataku unu la alian, ni agu komune por niaj komunaj interesoj, por nia komuna afero, por ke ni povu ĝui pli riĉan k pli feliĉan vivon. »

Kiam Teodoro estis dirinta ĉi tiujn vortojn, multaj aplaŭdis lin, ĉar vere, la nuna stato ne plus estis eltenebla pro manko de sinrego, de humano k de toleremo ĉe multaj anoj el la familio. Kaj oni komencis kredi al frato Teodoro, kiu nun ne plu penadis por sia konvinko, eĉ grandparte ĝin forlasis por flati tiujn gefratojn, kies helpon k subtenon li nepre bezonis por sukcesi en sia plano.

Kaj tiel okazis, ke la potenco de Teodoro pli k pli grandiĝis, ĉar oni fidis al li k oni deziregis harmonian vivon, kiu estus la realiganto de pli da feliĉo en plej vasta senco. Li fariĝis la protektanto de la unueco, oni donis al li aŭtoritaton, ĉar, ĉu li ne estis la eltrovinto de la unueco, ĉu li ne estis la iniciatinto de la harmonio, bazo de riĉo k feliĉo, bazo de venko ?

Tiel Teodoro akiris la potencon, al kiu li jam delonge sopiris. Tiel li povis trudi siajn celadojn al la aliaj, celadoj, kiuj jam konstante ŝanĝiĝis pro la nova situacio en kiu li sin trovis. Ĉiu, kiu konigis ideojn, kontraŭajn al tiuj de Teodoro, estis punata, ĉar la protektanto de la unueco fervore ekstermis ĉiun, kiu endanĝerigis la unuecon. La eldiro de opinioj fariĝis io, kion nur la plej kuraĝaj anoj faris, la aliaj, la timemaj, adaptiĝis al Teodoro, ĉar la potenco estis ĉe li, k bontrakto dependis de lia favoro. Sed neniu estis feliĉa k oni sekrete mokis la unuecon, kiu faris el la familianoj obeemajn sklavojn, hipokritulojn, denunculojn, k kiu forprenis de ili la plej elementajn rajtojn individuajn. Neniu estis feliĉa, eĉ Teodoro ne, ĉar li sciis, ke multaj malamas lin, k ke nur per kruelaj rimedoj li povas teni la potencon tiel ruze akiritan.

Kaj la plej saĝaj komprenis, ke ili estas trompitaj k ke ne eblas esti feliĉa sub la kondiĉoj de tia unueco. Ĉi tiuj komprenis, ke la feliĉo de la homoj grandparte dependas de la kvanto da libero por ĉiu individuo.

Kaj tie ĉi finiĝas la rakonto pri la unueco... de la perforto.

B. W.

Kiom ajn antikva estas la ideo pri unueco, ĝi estas k estos aktuala porĉiame. Kiom ĉi tiu ideo estas simpla k ŝajne klara k komprenebla al ĉiuj, tiom, bedaŭrinde, samtempe ĝi estas malfacile aplikebla en multaj okazoj. Kaj tamen ĝi estas la nepra kondiĉo por ĉies venko.

Kaj jen la momento de la decida lukto proksimiĝas per grandegaj paŝoj. La kapitalismo jam atingis la lastan imperiisman fazon. La nuna ekonomia krizo ne estas jam pasonta simpla malsaneto de la kapitalismo, ĝi estas mortiga malsanego, kontraŭ kiu la kapitalismo, por prokrasti sian neeviteblan morton, posedas nur unu rimedon : Faŝismo k milito. Tial do ni povas observi, kiel lastatempe la kapitalista klaso kun sia aro da servistaĉoj en t. n. demokrataj landoj inkliniĝas ĉiam pli k pli faŝismon. Diverslandaj kapitalistemaj politikpartioj nomantaj sin demokrataj, ĉiam pli forte esprimas siajn simpatiojn al faŝismo k ili estas tuj pretaj, se nur oni bezonus, kuniĝi kun la faŝismo por batali kontraŭ proletaj movadoj.

Unuvorte ni, proletoj, staras antaŭ la formiĝanta kapitalista unuecfronto, k de nia flanko ne povas sekvi alia respondo, ol tuja formado de la kontraŭa, sama unuecfronto en ĉiuj landoj, se ni ne volas esti devigataj partopreni la preparatan ĝeneralan buĉadon k iri sub la jugon de l'faŝismo.

Se ĉi tiu taktiko estas nepra k aplikebla en politikaj laboristaj movadoj, kiom pli ĝi estas bezona k dezirinda en nia esperantist-laborista movado. Ĉu ne ni ĝuste devas esti laŭstatute « la plej kapablaj k plej perfektaj el la tielnomataj internaciistoj » ? Ĉu ne ni devas esti interkomprenemaj k toleremaj al diversaj politikaj laborist-tendencaj sistemoj ? Ĉu ne ni tial devas lumi kiel bona ekzemplo por ĉiuj klasbatalantoj k forgesi antaŭajn malkonsentojn k la unuaj ekkrei unuecon en nia laborista esp. movado ? Ĝuste ni, kiuj estas ĉiuj forte kunligitaj per la grandega ideo, kiun ĝuas neniu alia laborista movado, nome pere de l'ideo de nia belega mondlingvo, esperanto, la patria lingvo de ĉiuj estontaj teranoj !

Lastatempe ĉiam pli ofte aŭdiĝas voĉoj de niaj K-doj por unuigi la lab. esperantistan movadon, kio pruvas ke ĉi tiu ideo estas jam nepre bezona, ĉiam pli k pli dezirata k ĝeneraliĝanta en nia movado. Tial do mi esperas ĝuste esprimi la pensojn de la plejparto, se ne de ĉiuj, el la organizita laborista esperantistaro, tiel SAT-anoj, kiel IPE-anoj k ISE-anoj, se mi vokos : « Ni forgesu pri pasinto ! Ni tuj serĉu la vojon por unuigi la lab. esperantistan movadon ! Vivu la Unueco ! » Amiko.

Amsterdamaj SAT-anoj ! Sabate, la 8-an de januaro, la urba SAT-Rondo kunvenos en la ejo de sekcio 5-a, v. Kinsbergenstr. 28. Grava tagordo ! — *Perantino.*

ALVOKO ! Mi petas, pro grava k por la propagando utila laboro, informojn *el ĉiuj landoj.* (kun escepto de Francio) pri ORGANIZADO DE LIBERTEMPO por infanoj, maturiĝantoj k plenaĝuloj. Antaŭdankante pro serioza kunhelpo : K-do *A. Capoulade,* 13, rue Issanka, *Sète* (Hérault), Francio.

Tra la Esperanta Gazetaro

Naciismo, internaciismo...

La morto de l'prezidanto Masarik, mem arda naciisto, ĉar fondinto de l'ĉeĥoslovaka respubliko sur la bazo de nacia rekolektiĝo, okazigis en la esperanta gazetaro multajn komentojn k laŭdajn, honorigajn artikolojn. Unuavice komprenebIe en la ĉeĥaj esperantaj gazetoj (ankaŭ en la laborista bulteno eldonata de la Plzenaj K-doj). Laŭŝajne tiu morto de eminenta ŝtatisto reardigis iagrade la flamon de naciemo ĉe la ĉeĥoslovaka popolo (kiu tamen konsistas el pluraj naciecoj!) (1). En *Ligilo* (n-o 9) priskribante siajn impresojn el la Varsovia kongreso, St. Szeeman tamen riproĉetas la organizintojn de l'surtombeja procesio, pro tio ke la esperantistoj devis kolektiĝi *laŭ nacioj.* Tute prava estas tiu riproĉo, ĉar « sur tombejo inter la tomboj, kiuj egaligas riĉulon kun malriĉulo 2), feliĉulon kun malfeliĉulo, eŭropanon kun aŭstraliano k tiel plu, preskaŭ ridinda estas paroli pri dividiĝo laŭ nacioj... » Sed la skribanto diras ankaŭ : « Ne pro tio (mi riproĉas), ke eble esperantistoj deziras sennaciecon, ĉar tion ni certe ne volas, respektante ĉies naciecon... »

Ĉi tie kuŝas la kontraŭdiro : *Sennaciecon,* tamen tiel naturan al uzanto de *mondlingvo,* oni timas kiel malsanigajn bacilojn. Malgraŭ tio, — la infektiĝo daŭre okazas per fervora aplikado de esp-o, k per tiu « nekuracebla » esperantista emo al interrilatado trans la landlimojn, kiu karakterizas ne nur la proletan sektoron, sed ankaŭ la neŭtralan. Vole-nevole...

Sur la vojo de Zamenhof

En la Bulteno de l'*Amsterdama SAT-Rondo* (novembro) T. E. Leskopo komunikas kelkajn trafajn observojn pri la esp-a movado. Li ankaŭ tre bone karakterizas nian laboron, alvokante samtempe por aliĝo al SAT, per jenaj linioj : « Aktuala ŝajnas esti la konsidero pri internacia strukturformo (U.E.A. — I.E.L. — I.P.E. — I.S.E.) Heziteme oni staras sur la sojlo de nova strukturformo, kiu estas ankaŭ defendita de nia majstro Zamenhof. La nova lumo timigas multajn. Ni SAT-anoj trovas en ĝi protekton de pionira laboro k eksperimentaj ebloj, utilaj por la homaro. SAT plenumas gravan taskon; ni subtenu ĝin laŭpove k tutforte!»

« Ĉe botisto la ŝuo estas ĉiam kun truo »...

Tiu ĉi konsidero sendube superregis ĉe la redaktoro de nova gazeto, kiu havas la titolon « Per Unuigitaj Fortoj » (3). S-ro M. Movo (pseŭdonimo de M. Wittenberg) skribas, prezentante sian « ĝenerala revuo de la esp-movado » interalie : « Tanga tipo de interesa ĝenerala internacia Esperanto-gazeto ankoraŭ ne estas kreita. *Per Unuigitaj Fortoj* ne ŝparos klopodojn por kontribui al la solvo de la problemo, tiom grava por nia movado ». Jes, nia botisto trovis, ke la ŝuo havas truon. Aktivulo de la movado, lasinte sian antaŭan agadkampon, li komencis starigi propran entreprenon, nur ne pensante pri la konata proverbo : « Tro da kuiristoj kaĉon difektas » (eĉ... per unuigitaj fortoj). El la enhavo de la unua n-ro (presita sur helverda papero) : Duonjarcenta jubileo. Internacia Ekspozicio pri Arto k Tekniko. Pri normigo de la scienc-teknika lingvo. Tute ne bezonata estas internacia helplingvo... Esp. Kroniko. Humora paĝo (NEKOREBO). Industrio k Komerco. Ktp.

Nova ekstrem-orienta pioniro

En Seoulo aperis novembre la unua n-ro de « Korea Esperantisto » (Red. k adm. adreso : 190, Johoku-ĉo, *Seoulo,* Koreo). Laŭ la eksteraĵo ĝi similas al la *Revuo Orienta* (Tokio): sama formato (15 × 22 cm), sama kovrilo, samaj litertipoj. La enhavo estas tute esp-lingva. La redaktoro (Hengwi Hong) skribis titole la devizon « per esp-o ĝustan (4) Koreion al la tutmondo », sed, li rapide aldonas : « ne miksite kun la politika afero ». La gazeto volas liveri literaturaĵojn pri Koreio k el ĝi, volas interpreti korean kulturon antaŭ la tutmonda publiko esp-ista. Kaj s-ro Tojokaŭa esprimas en salut-artikolo ankaŭ jenajn ideojn : « Kulturo de ĉiu gento ĉiam donas, brikojn al la homa kulturo en estonto. La estonta kulturo de la tuta homaro naskiĝas en la kunfandiĝo de l'kulturoj de ĉiuj gentoj. En tiu senco *Korea Esperantisto* ankaŭ liveros ian utilon al la homara kulturo ». Necesas atendi pluajn n-rojn, por povi prijuĝi la valoron de tiu novulo, kies abonprezo estas 2 sv. fk. aŭ egalvaloro jare.

Pli bone malfrue, ol neniam

Agrablan surprizon preparis al ni « Popola Fronto » en sia n-ro 26-a, en kiu la redakcio elmontras, ke ne pro nura hazardo naskiĝis *esperantismo* en la medio esperantista. « P. F. » citas la ekzemplon el la 2-a universala kongreso de esp-o (en Ĝenevo), kiam Zamenhof respondis kun arda fervoro al tiuj, kiuj proponis ne ligi la mondlingvan movadon kun specialaj sentoj (nome pri interfratiĝo de l'homaro k.s.). Zamenhof « diris fiere, ke tiu deziro ne povas esti akceptata, ĉar esperanto devas esti idealo pli alta ol internacia kodo por komercaj k turismaj rilatoj... » Ni ĝojas, ke « P. F. » per tio klare rekonas, ke esperanto, kvankam ĝi estas ilo uzebla de ĉiuj ajn, kiel telefono aŭ radioaparato, — per si mem entenas ion revoluciigecan, ĉar la uzantoj de la lingvo spertas la influon de la ilo sur ilian spiritostaton : tia lingvo ne povas prosperi k disvastiĝi en naciistaj k faŝistaj rondoj...

Pri la Pariza Mondekspozicio

K-do H. Koppel en *Harmonio* (Viena grupgazeto) de novembro kompletigas la « imprese-tojn », presitajn en n-o 459 de «S-ulo» (p. 10). Li skribas : « Kun... 3 nederlandanoj mi eniras la rusan pavilonon. Du junajn oficistinojn, scipovantaj preskaŭ ĉiujn mondlingvojn, mi alparolas france, ĉu ili scipovas esperanton aŭ ĉu nia ideo estas multe disvastigata en Sovetio. Kaj ili respondas, ke « esp-o estas mortinta (!!) lingvo » k « la sovetianoj, kiuj devas lerni la francan, anglan aŭ germanan lingvon, ne disponas pri sufiĉe da tempo por la lernado de tiu ĉi mortinta lingvo ! » Mia nederlanda amiko Bank tre ĉagreniĝis pri tio, ĉar li mem korespondas kun tiu lando. Preskaŭ la samajn vortojn mi aŭdis de oficistino en la nederlanda pavilono. Jes, de Nederlando, en kiu estas tiel imponaj esp. organizoj. Sed la kulpo estas ĉe ni, ĉar ni esp-istoj ne postulis, ke estu en la pavilonoj ankaŭ esp-parolantaj oficistoj!...»

K-do H. K. eble ne pripensis, ke poliglotaj oficistoj ne povas havi alian ol malamikan sintenon rilate esperanton. Ĝenerala enkonduko de esp-o ja superfluigus ilin, forprenus ilian panakiron...!

---

(1) Komparu la artikolon « Du demokrataj ŝtatistoj mortis », en *Senn. Revuo* n-o 10 (58).

(2) La rimarko ne estas tute ĝusta : eĉ per la tomboj distingiĝas riĉuloj de malriĉuloj ; la unuaj ja permesas al si ofte luksajn tombomonumentojn. Nur la nekapablo eviti la morton, estas propra al *ĉiu* homa estaĵo, sen diferenco pri havaĵo... Kvankam riĉuloj, se ili ne diboĉas, malpli rapide eluziĝas k havas rimedojn por iom plilongigi sian vivon.

(3) Unua n-ro (novembro): 16 paĝoj, formato 19 × 25 cm. Du fotobildoj. Jarabono (12 n-oj) — meza prezo 35 fr. frankoj. Adreso : *M. Movo,* Rue Jullien, 84, *Vanves* (Seine), Francio.

(4) La vorto *ĝusta* estas ĉi tie maltrafe aplikita. La aŭtoro volas diri : Per esp-o (liveri) ĝustan (veran) *bildon pri* Koreio !

Kolbasistoj !

Mi deziras interŝanĝi laboron dum ses monatoj kun kolbasisto en ĉiu ajn lando. Prefere en koopera entrepreno. Adresu : *Frank Johansson,* Allhelgonagatan 1, 11, *Stockholm* (Svedio).

Pensoj pri Esperanto

Leginte la artikoleton de K-do Aldvorth, mi miris iom. Ĉu estas necese tiel kaŭzi dubon pri la estonteco de nia lingvo? Certe, mi legis la citaĵojn el la ĉefa angla gazeto. Tamen, tiaj asertoj el gazeto, sendube iom naciema, ne dubigis min. Ĉu la fakto, ke 400 milionoj da homoj parolas la ĉinan kiel sian patran lingvon, faras tiun ĉi lingvon mondlingvo? Ne, certe ne. Same, la 220 milionoj da homoj, parolantaj la anglan kiel sian patran lingvon, ne faras tiun ĉi lingvon mondlingvo. Restas la 20 milionoj da homoj, uzantaj la anglan lingvon kiel duan lingvon. Sed kiom da jaroj pasis por atingi tiun ĉi nombron? Ĉu nuntempe pli da homoj lernus la anglan lingvon ol esperanton? Ni ne forgesu ke por scipovi la anglan lingvon, oni devas studi almenaŭ trioble tiel longe ol por esperanto. Kaj lerninte la anglan lingvon, mi ankoraŭ ne estas certa ke angloj komprenos min. Cetere, la lernado de la angla lingvo estas rimarkinda fakto. Sed ne fakto por dubi pri nia lingvo. Nur kiam la angla lingvo fariĝus tiel facile lernebla por ĉiu homo kiel esperanto, tiam ni dubu. Sed tio neniam okazos. Plie, nek la B.B.C., nek la adeptoj de « Basic English » kapablas grave malhelpi la progreson de nia lingvo. Ilia penado nur estu instigo, por ke la esp-istaro pli forte propagandu k disvastigu sian lingvon. Ĉu ni rajtas post 50 jaroj fieri pri nia lingvo? Jes, ni rajtas fieri, sed fierante ni devas ankaŭ labori!

Ĉiu esperantisto ne dubu, ne fanfaronu, sed forte k persiste propagandu k disvastigu esperanton, ankaŭ en tiuj landoj, kie (sume) 220 milionoj da homoj parolas la anglan kiel sian patran lingvon. Tiam, laŭ mia opinio, esperanto certe venkos!

W. Hamelink (20.223).

DISKUTEJO

For la Neŭtralismon!

Leginte en la novembra « S-ulo » la artikolon de K-do Veder, mi sentas la bezonon respondi al nomita K-do. Ankaŭ pro tio, ke en lia skribaĵo la debato inter la redaktoro de « Popola Fronto » k mi estas tuŝita. Ŝajnas al mi ne superflue doni kelkajn klarigojn pri mia «elpaŝo», ĉar al ĉiu la afero certe ne estas sufiĉe klara. Laŭ multaj ĉeestintoj mi estis la nura maltaŭgulo, kiu dum iom da tempo frakasis la kamaradecan atmosferon, kiu stampis la tutan kongreson. Laŭ tiuj Gek-doj la redaktoro de «P.F.» nur venis al nia kongreso por pligrandigi ĉe ni ĉiuj nian kontraŭfaŝistemon k nian solidaron kun la kontraŭfaŝistaj hispanaj batalantoj, sen ia altrudo de sia partipolitika starpunkto, sen ia malico al aliaj proletaj tendencoj. Ni vidu!

Samkiel K-do Veder, mi malŝatas neŭtralismon; ne nur en SAT, sed en la tuta vivo. Mi eĉ ne kredas al ĝi, k mi opinias, ke ĝenerale ruzuloj pledas por ĝi, nur por mem agi neneŭtrale. Sed iom stranga la afero fariĝas, kiam K-do V. trudas al SAT ian neŭtralismon, tial ke ni evitas aŭ klopodas eviti politikajn debatojn en la kongreso. Komprenu bone, ke ĉi tie temas pri *parti*politikaj debatoj, ĉar se ni prenas la terminon politiko pli larĝa, niaj kongresoj ĉiam estis k estos politikaj. Ĉu esperanto, al kiu ni ligas ideon k per kiu ni supozas pliperfektigi la klasbatalon, ne estus io politika? Ĉu interrenkontiĝoj de proletoj el malsamaj landoj kun la celo pligrandigi la tutmondan solidaron k malfortigi la naciismon, kiu certe ankoraŭ latente estas en ni, ne estus io politika? Sed K-do V. volas interŝanĝi ideojn politiktendencajn, li volas trakti problemojn pri taktiko en la ĉiutaga politiko. Sed kiel tiuj punktoj povus veni sur nian tagordon?... Kaj se ili ne venas sur la tagordon, ili per si mem forrestas, almenaŭ se oni obeas tiun ĉi tagordon. Ni kongresas por trakti organizajn problemojn k por interkonatiĝi. Tamen, en apartaj kunvenoj, en lekciaj kunvenoj, oni povas aŭskulti k refuti alies politikan starpunkton. La Roterdama O. K. K. estis preta aranĝi tian kunvenon, sed venis neniu instigo de la membroj, venis neniu, ku anoncis sin por lekcii. Mi estas certa, ke la SAT-anoj ne ŝatas tiujn politikajn debatojn en la kongreskunsidoj. Mi gratulas nian organizon, ke ĝi nuntempe ne estas plenplena de tiaj homoj, kiaj ĉie k ĉiam emas politike debati, ĉar ofte ili estas nur pedantaj, partifanatikaj babilaĉuloj, kiuj miskreditigas la klasbatalon k konsideras ĉi tiun kiel sporton. Estu certa, K-do V., ke tiaj uloj en niaj kongresoj havus la plej grandan buŝon. Sed la aliaj singarde evitus la kongresejon. Do, en niaj kongresoj ne politikaj debatoj! Ĉu nun la neŭtralismo de SAT estas pruvita? Ĉu estas organizo, en kiu la membroj tiel libere povas diri siajn ideojn kiel en SAT? Ĉu niaj organoj ne estas plene je la dispono de la membroj? Ĉu oni ne *senpere* povas proponi al la kongreso ian ŝanĝon? Ĉu unutendenca movado, partio aŭ sindikato povas doni al siaj membroj tiom da libero, tiom da okazo politiki laŭ propra gusto? El kio konsistas fakte la politiko en tiuj organizoj? Nur la ĉefaj instancoj faras la politikon k la membroj devas obei... aŭ opozicii. Organizo, en kiu regas tiom da libereco, tiom da individuismo, kiom en SAT, ne povas esti k ne povas fariĝi neŭtrala. K-do V. devus kompreni tion.

Nun pri la debato en la R'dama SAT-kongreso. Por multaj K-doj la ripetita raporto de la redaktoro de « P. F. » pri la stato en Hispanio nur estis objektiva deklaro, kiel ĉia antifaŝisto estus deklarinta. Sed tiuj, kiuj jam konis la hispanan dramon de ĉiuj flankoj, sciis, ke nomita redaktoro ne senmotive tiel forte akcentis la frapantan harmonion, kiu ekzistus inter la hispana laboristaro. Tiuj ankaŭ sciis, ke apartenis al la politiko de l'nomita redaktoro, forsilenti k se eblas nei la ekziston de aliaj konceptoj pri antifaŝisma batalo, forsilenti la plej barbarajn persekutojn al miloj da samklasanoj, bravaj batalantoj kontraŭ la faŝismo k por nova ordo. Apartenis al la politiko de ano de tiu popol-fronto, kiu konsistas el diversspecaj burĝemuloj k kominternaj diplomatoj ŝajnigi, ke ilia tendenco, ilia vidpunkto estas la ununura. Kaj kiel bonege oni estis helpata, ke el Barcelono, kie la SAT-anoj jam kolektis monon por la vojaĝo al Roterdamo, neniu povis veni, pro tio ke *lastmomente permeso forlasi Hispanion ne estis donata*. Se okazas tiaj aferoj, ĉiu povas kompreni, ke naŭza partopolitiko ludas grandan rolon. Tiam povas esti necese, ke de iu la masko estu forŝirita, precipe kiam oni atakas aliajn pri sektemaj agoj, dum oni mem per masko popolfronta klopodas kaŝi sian servadon al la 3a Internacio.

Kaj oni nun povas diri, ke por pligrandigi la entuziasmon k solidaron por la hispana afero, tiu misinformado estis prava, sed se temas pri la sorto de miloj da kamaradoj, se temas pri anoj de nia organizo, kiuj estas murdataj nur pro tio, ke ili faras sian klasan devon laŭ propra idearo, tia misinformado, kiu nur estis politika manovro, neniam povas esti prava, almenaŭ ne en niaj SAT-kongresoj.

En SAT ĉiu tendenco laborista estas samrajta. Neniun tendencon ni aparte flatas. Tial la redaktoro de *P. F.* estis ĉe ni, kiel SAT-ano, simpla kongresano, k ni ne havis motivon fari lin honora membro de la kongreso, kiel tio okazis en la I.P.E.-kongreso.

Mi do principe estas kontraŭ la politikaj debatoj en nia kongreso, sed se oni silentigas iun membron, dum alia venas kun partipolitikaj celadoj, ja tiam mi ne povas rezignacii.

Bas Vels.

« Se SAT volas ludi gravan rolon, se ĝi volas pravigi sian ekziston en la historio de la homaro, ĝi devas trovi vojon, rimedojn por ebligi la plej larĝan debaton, malpermesante nur malveron k maldecon en la debato. — Ju pli frue la SAT-anoj konsciiĝos pri la vero, ke neniu povas eviti la debaton pri politikaj problemoj, k ke, laŭ la vivo, neniu tion faras, eĉ ne la plej fanatikaj « neŭtraluloj », des pli frue ni suriros la vojon « plej rektan k plej irendan » por ĉiu el niaj samklasanoj, la vojon, kiu forkondukos la homaron al kiel eble plej alta ŝtupo de civilizo k kulturo ».

Tiel sugestas K-do Veder en novembra « S-ulo ». Oni povus tion konsenti. Sed... la okazintaĵoj en Roterdamo komprenigis al multaj ĉeestintoj, ke tamen ne jam estas irebla tiu vojo. Ĉar la unua ekpaŝo sur tiu « malpermesita » tereno, estis sufiĉa por estigi akretonan debaton k taglume elmontri la profunde dormstate kuŝintan malharmonion regantan rilate la politikajn problemojn, raportis la redaktoro de « S-ulo ». Ankoraŭ plion tio vidigis. Ĝi denove konfirmis, pravigis eldiron de iama eminentulo en nia movado, nome, ke la membroj ne sufiĉe edukiĝis laŭ la statut-paragrafo, kiu celas ke ili estu komprenemaj k toleremaj rilate al la politikaj k filozofiaj skoloj aŭ sistemo, ktp. Ĉar, se ili ja sufiĉe estus edukiĝintaj, ne povus okazi, kiel okazis, kiam iu tuŝetis politikan aferon, ke aliuj en la salono krie aŭdigis havi alian opinion ol la K-do parolanta; ne povus okazi ke SAT-anoj diris: K-doj A. k Z. ankaŭ estas perfiduloj, faŝistoj *(tiel)*, mi ne plu volas rilati kun ili. Ĉu en tiaj cirkonstancoj sekvi la konsilon de K-do Veder? Tio estus dispartigi, pereigi SAT-on. Ankoraŭ nun estas nepre necese akcenti la edukan flankon, por tiel celi atingi plej altan ŝtupon de civilizo k kulturo k ekhavi rimedojn por ebligi la plej larĝan debaton.

Almenaŭ laŭ la sincera konvinko de L. B. *Rulofs (19.936)*.

Ĉiu plenumu sian devon...

K-do E. L. Itanŝa skribas en «S-ulo» n-o 459, ke « SAT havas ankaŭ specialan devon: esti same akceptema al la tezo de l'sennaciistoj, kiel al tiu de la internaciistoj. Nia organizo estas laŭstatute ekstertendenca ».

Ĉu K-do E. L. I. opinias, ke lia artikolo helpas al la plenumo de tiu ĉi speciala devo? Unue li per tiuj frazoj, kiujn ordinare uzas konservativaj burĝoj, mokas la pacistojn, al kiuj certe granda parto de la SAT-anaro apartenas.

Due li atakas la internaciistojn, ankaŭ granda parto de nia anaro, eble la plej granda. E. L. I. samkiel multaj aliaj intermiksas la konceptojn « ŝtato » k « nacio ». Li skribas: « La sendependeco de via lando estas minacata... » ktp. Sed la landa limo (t.e. la ŝtata limo) tute ne estas identa kun tiu de la nacio. En suda Danio loĝas multaj germanoj k en norda Germanio multaj danoj. Respondan fenomenon ni povas vidi en multaj aliaj landoj. E. L. I. forgesas, ke la afero ankaŭ havas kulturan flankon.

Li ŝajnigas, ke nur ekzistas tiaj internaciistoj, kiuj akceptas la doktrinojn de Wilson k Lenin. En absoluta malharmonio kun la vero k rekte ofendaj al multaj SAT-anoj estas la bombastaj vortoj: « Internaciisto *devas* buĉi aŭ esti buĉata ».

Kiam oni plue legas, ke « la bonintenca agado (de la internaciistoj) estas tamen niaopinie *esence* reakcia... », oni ankoraŭfoje rigardas supren por vidi, ĉu oni ne legas en la rubriko de la « Sennaciista Frakcio ». Ne; sed eble tiu titolo forfalis. (Ni ja ne kredas, ke la ĉiam nepartieca redakcio presigas ĉi tiun artikolon senkomente en la oficiala parto de la gazeto). Ankaŭ estas strange, ke E. L. I. volas esti membro de SAT, kies plej multaj membroj certe estas « reakciuloj » laŭ li.

Verŝajne pacisto atentigus pri jenaj vortoj de E. L. I.: « nur por defendi sian homecon li (sennaciisto) konsentas morti aŭ mortigi ». Do,

Arts Graphiques, s.c., 201, chaussée de Haecht, Bruxelles-3. Gérant : J. Léchevin. T.: 15.95.78
Editeur responsable : L. Glodeau.
Imprimé en Belgique.

por defendi sian homecon li fariĝu malhomo.

« Ĉiu ja plenumu sian devon k tion farante neniu rajtas riproĉi al la alia », skribas E. L. I. — eble por gardi sin mem kontraŭ kritiko. Sed ŝajnas al mi, ke lia tuta artikolo estas — per milda vorto — nur « riproĉo » al aliaj. Ĉi tion mi celis montri k samtempe, kiom plena da kontraŭdiroj k unuflanka rigardo estas la artikolo.

H. P. Frodelund.

Noto de la Red.: K-do H. P. F. ankaŭ forgesas, ke la frakciaj rubrikoj devas servi nur por organizaj komunikoj. Ĉi tie temas pri ĝenerala teoria artikolo, povanta laŭŝajne interesi ĉiujn, ĉu sam- ĉu malsam-opiniantojn. Cetere, ĉu necesas rememorigi ankoraŭ fojon, ke *ne* la redakcio, sed la aŭtoroj respondecas pri la enhavo de l'artikoloj? La red. nur devas atenti, por ke ne okazu reciprokaj *ofendoj*. Ni miras, ke H. P. F. povas senti sin ofendata per la logika argumentado de K-do E. L. I.; eble li ne komprenis, ke la celataj « pacistoj » estas nur tiu speco de sin-nomantaj pacistoj, kiuj kontentiĝas per aprobo al belsonaj rezolucioj k alvokoj, sed ke E. L. I. *ne* celis la konsekvenculojn el la esperantista tendaro, kiuj *aplikante esp-on* k efektive *praktikante* interhoman alproksimiĝon, montras sin *realaj* pacistoj !

Formu Studrondojn !

Studante la novan katalogon de SAT-eldonaĵoj oni konstatas, ke fakte ni per la SAT-stoko posedas ne nur konsiderindan beletristikan trezoron, sed kolekton de laŭteme valoraj k eĉ tute *malmultekostaj* libroj k broŝuroj, kiuj tutcerte estas pli indaj por uzo ol ĝis nun okazas.

Multaj organizoj ekster nia movado dum la vintroj formas studrondojn, kie ekz. 10-15 personoj kune esploras k pridiskutas difinitan temon. *Kial ni ne agu same?* Laŭ mia opinio ni ne nur estu lingve persistaj, sed ni ankaŭ komprenu apliki la pene lernitan lingvon, ĉu ne ? Mi proponas fondon de studrondoj ekz. pritraktantaj jenajn temojn :

Heredoscienco, Sekspsikologio, Ekonomia geografio, Filozofio, Socia scienco, Fiziko-ĥemio, Lingva scienco, Esperanta historio, ktp, ktp.

Por studi ĉiujn nomitajn temojn ekzistas bonegaj fundament-libroj en la SAT-stoko. Kompreneble ĉiu partoprenanto posedu la fundamentlibron. Kaj per fragmentoj el nacilingvaj libroj k eventuale verkoj el neŭtralaj eldonejoj eblos bonege organizi la aferon.

Iru ni do al serioza aplika laboro. Partoprenante en esp-lingvaj studrondoj ni atingas tri gravajn celojn : 1. Utili al nia lingva progresado; 2. Utili al propra scio k spirita evoluo ; 3. Utili al la SAT-eldonejo, ebligante aperigon de novaj, pli grandaj k pli gravaj verkoj.

P. Th. (18334).

Ĉu Socialismo konstruiĝas en Sovetio ?

DE E. LANTI K M. IVON

estas la plej konciza, valora k fidinda atesto pri la nova socio, kiu stariĝas sur unu sesono de l'mondo. Ĉu oni aprobas aŭ ne la konkludon de la aŭtoroj, — estas almenaŭ tute certe, ke tiu verketo estas nepre leginda. De kiam ĝi aperis, okazis en Sovetio multaj faktoj, kiuj pravigas ĝian enhavon, konfirmas la tezon de la aŭtoroj. Legu k legigu la broŝuron. 52 pĝ. (form. 14 × 21 cm) ; ilustrita. Prezo : 3.50 ff. (2 internaciaj respond-kuponoj). Havebla ĉe R. Roberts, 1, Caister Ave, Whitefield, MANCHESTER (Anglio) aŭ ĉe SAT.

NEKROLOGO

Post longedaŭra suferado mortis en ZWOLLE (Nederlando), la 28-an de novembro, en la aĝo de 53 jaroj, unu el niaj plej batalemaj k oferemaj membroj:

K-do Willem Bosch

fidela membro de SAT (n-o 19.101), de la urba SAT-grupo k de la Ned. L.E.A. Korpe li forlasis nin, sed spirite li restos inter ni !

Ĉi tie ni esprimas sinceran elkoran saluton al la inda K-do, kiu ne vane vivis.

La urba SAT-grupo de Zwolle.

En la komenco de novembro mortis

K-do A. Sornasse

en sia 21-a jaraĝo.

Konscienca junulo, febre studema, li fariĝis post mallongtempa lernado, tre sperta k fidela SAT-ano. Korpe malfortika, spite la ŝajno kontraŭa, lia studemo troigita pretigis la terenon por la ftizo kiu lin forrabis. Lia patrino, de la sorto kruele batita, trovu ĉi tie la esprimon de niaj sinceraj kondolencoj k de nia ĉagreno.

La Brusela SAT-Rondo.

EN NIA MOVADO

(Kroniko)

POLIO. *Krakovo.* La loka lab. esp. klubo, havanta ĝis nun 65 membrojn, aranĝis kurson por komencantoj en sia ejo kun 23 personoj, k duan kurson en urba muzeo por industrio (la direktoro disponigis senpage ĉambregon) kun 63 kursanoj (gvidas Leo Turno). La neŭtraluloj komencis kurson en la sama muzeo kun la sama instruanto (45 p.). Kompare kun Varsovio, la lab. esp. movado estas ĉi tie pli vigla, pli bone organizita. Se SAT-kongreso okazus en iu venonta jaro en Polio, ĝi devus okazi en Krakovo (la laboristoj krakovaj ne timas la policanojn nek la faŝistojn, k la faŝistoj ne permesus al si primoki eksterlandanojn, kiel okazis en la Varsovia Jubilea Kongreso de Esp-o). Cetere la vizitontoj ne trovus la vivkarecon kiel en Varsovio, ĉar la laboristoj mem zorgus pri la kongresaranĝoj.

FRAKCIA VIVO

Ni ricevis plendon de SAT-ano pro tio, ke frakcia gazeto okupiĝas pri la strukturo de SAT. Ni eĉ ne atendis tiun plendon, por atentigi, ke la Frakcioj ne havas la rajton interveni en la funkciadon de SAT (vd. p. 13 lastnumere.)

Komunistema Frakcio (3-a Internacio)

Sekretario : *Poul Thorsen*, Poppelgade 16, *Kopenhago*, K.

Kasisto : *Kaj Henriksen*, Hindsholm Alle 16, *Kastrup*, Danio.

El konsiderinde multaj landoj demokrataj k pli malpli faŝistaj ni ĝis nun havis la ĝojon ricevi pruvojn pri intereso k atento rilate nian frakcion. El batalanta Hispanio, paca Nederlando k Skandinavio, duonfaŝista Polio ktp, jes eĉ el fora Sudafriko — Capetown k Johannesburg — eĥis la ĝojo pro nia aktiveco k aperigo de nia dumonata organo RACI' NIN VOKAS... Kuraĝigaj estis mendoj k promesoj pri subteno, sed kun bedaŭro ni diru, ke kun kelkaj honestaj esceptoj ne multaj plenumis la promesojn. — Nun la nova jaro komenciĝas k ni faru novajn disponojn, aĉetojn ktp. Tial estas necese, ke ni sciu ĉu estas sufiĉe da *ekonomia* bazo por nia entrepreneto. Per privata k leterkarta subteno ĝi ne povas sufiĉe prosperi !

Ankoraŭfoje ni pretas sendi kontraŭ 1 resp. kupono, eĉ senpage, RACI' NIN VOKAS (jan. n-ron) al interesiĝantoj, petintoj ktp, — sed c tiam ni ekspedos nur al K-doj pagantaj (aŭ -i taj) sian laŭvolan kotizon. Okaze de novja ankaŭ estas tre dezirinda forta eldormiĝo c kelkaj landaj perantoj! *(Sekretario).*

Bolŝevist-Leninista Frakcio

La apero de nia organo « LEVIĜU » fak revivigis la frakcion. Precipe el Hispanio Francio alvenis abonoj al nia gazeto. Ĉar K-d Oĉjo pro politikaj kaŭzoj ne povas funkcii ki peranto de *Bolenfrasat* en Parizo, ni petas k alia pariza K-do transprenu tiun taskon. L adreson de nia hispania peranto ni kompreneb ne povas publikigi. La centra komitato de B *lenfrasat* konsistas nun el K-doj Paŭlo Mot Knud Nordgard k Tage Laŭ. K-doj vizitant Kopenhagon povas trovi tiujn K-dojn en il loĝejo : Romersgade 23. Kopenhago-K., kie a kaŭ estas la klubejo de « Laborista Esp. Kl bo ». Por poŝtaĵoj tamen nur uzi la adreson Tage Laŭ, Kjeldgardsvej 33, *Kopenhago-Valb* (Danio) (kiu restas nur poŝta).

La dua kajero de « LEVIĜU », *pli ampleks* ol la unua, 12-paĝa aperis. Fruntartikolo : «Viv la rusa revolucio, vivu la hispana revolucio estas skribita de hispanaj K-doj. Du artikol de Leo Trocki. Ankaŭ interesa materialo pri l en Svisio de G.P.U. murdita K-do Ignac Rejs La abontarifo estas laŭpova. Senlaboruloj, kiu sendas al ni korespondaĵojn, ricevas la gazeto senpage.

17634.

Sennaciista Frakcio

Aperis dum novembro la dua n-ro de « Sennaciista Bulteno » (6-paĝa). Ĝi entenas i. a respondon tre detalan de K-do Lanti al « publika letero pri sennaciismo » de K-do Bos (dissendita en julio kun « Popola Fronto »). Ankaŭ en ĝi troviĝas alvoko por « Ekspozici de l'Naciismo », kies organizado estis decidit en la frakcia kunsido de la Roterdama Kongreso. La n-ro estas havebla por prezo de 3 penco (1 resp. kup.) ĉe la sekretario : K-ino *R. Roberts*, 1, Caister Ave., *Whitefield, Manchester*, Anglio.

Ekster nia Movado

Sur la plej malgranda kontinento ĵus fondiĝis *Aŭstralia Esperanto-Asocio*. Celo : Subteni oficialan esperanton ĝis la rolo de mondlingvo. Prezidanto : (ĝis la 1-a de majo de la 51-a esperanta jaro) s-ro Joab Eljot. Aliĝrajto : al ĉiu, kiu konsentas la Celon, eĉ se li mem nek esta esp-isto, nek uzas oficialan esp-on. Provizor adreso : 2 Cambridge Str. *Willoughby*(N.S.W.), Aŭstralio.

En Budapesto okazos dum majo 1938 la 34-a Eŭkaristia Kongreso Internacia, patronata de la papo, kiun partoprenos kredeble pr. 500.00 katolikoj. Luksa plurlingva turisma informilo, proks. 450-paĝa, estos redaktita i.a. en esperanto. Eldonkvanto : 40 mil ekzempleroj. (La libro antaŭmende kostos 4 pengojn ĉe la eldonejo « Reflektor », Rottenbiller-utca 6, Budap. VII, kiu korespondas esp-e).

Mortis la 25. oktobro en Tübingen, en aĝo de 57 jaroj, la bonega gvidinto de l'Leipzig-a Libromuzeo, gvidinto de l'Internacia ekspozicio por Librotekniko k Grafiko, prof. d-ro A. *Schramm* (Ŝram).. Kiel esperantisto li fondis la Saksan Esp-Instituton, kies unua gvidanto li estis. Li propagandis multe por esp-o, organizis la 4-an Universalan E-kongreson en Dresdeno (grandioza sukceso!), redaktis la ilustritan gazeton « Bela Mondo » (1908/09), poste « Ĉirkaŭ la mondo ». Lia lernolibro por germanlingvanoj havis plurajn eldonojn. Li adaptis tre lerte la stenografian sistemon Gabelsberger al esperanto.

TARIF-REĜUSTIGO por BULGARIO!

Membreco kun « S-ulo » 65 levoj (jare). Membreco kun « S-ulo » k « S. R. » 130 levoj. Aliĝkotizo : 7 levoj. Nura jarab. al «S. R.» 75 levoj. La prezoj presitaj en la katalogo estas nuligitaj.